


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 551 (10) OKT. 1951



Oslo : la Haveno (*vidu p. 247*)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1952) : 15 ŝil. angla (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj artikoloj :				paĝo
Fidi je Propraj Fortoj : <i>D-ro Ivo Lapenna</i>	..	..	..	241
La Panteono, Vieno : <i>Hans Jakob</i>	..	..	..	250
la 36-a Universala Kongreso de Esperanto	..	..	..	255
la 37-a Universala Kongreso de Esperanto :				
La Urbo kun la granda koro : <i>J. H. Rosbach</i>	..	..	..	247
Aliĝilo	..	..	..	kovrilo
Konstantaj Rubrikoj :				
Enigma Konkurso N-ro 61	..	..	..	254
Esperantista Vivo	..	..	..	258
Felietono "La Alaska Stafeto"	..	..	..	261
Internacia Konkurso 1951	..	..	..	242
Niaj Kunlaborantoj : <i>Ragnvald Rian, Norvegujo</i>	..	..	..	249
Oficiala Informilo	..	..	..	264
Radio kaj Esperanto	..	..	..	263
Tra la Libraro	..	..	..	252
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	243
Vivo Virina	..	..	..	251

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 551 (10)

Oktobro 1951



D-ro Ivo Lapenna :

Fidi je Propraj Fortoj !

En Munkeno la superaj instancoj de nia movado dediĉis apartan atenton al la financa situacio de U.E.A. Ke ĝi estas malbona, estas pli-malpli ĝenerale konate. Ke kun la lasta-tempa terura altiĝo de ĉiuj prezoj kaj kun kotizoj al U.E.A. malpli altaj ol tiuj de la jaro 1920 (!!!), ĝi ne povas esti pli kontentiga, estas kutime ne tre konsiderate !

Estu kiel ajn, eliron oni devis trovi.

Ekzistis nur kvar eblecoj : entombigi la Asocion, peti donacojn, ankoraŭ pli ŝpari je la elspezoj, altigi la kotizojn.

Se oni forĵetas la unuan eblecon, kiel memmortigan ; se oni forĵetas la duan kiel nekonforman al la seriozeco kaj batalspirito de la movado, restas praktike nur la du lastaj.

Pri tiu punkto manifestiĝis du tendencoj. Ambaŭ celis la bonon de nia komuna afero.

Unuj—certe kontraŭ sia volo—preferis la malgrandigon de la Jarlibro kaj plian modestigon de nia gazeto. Tiamaniere oni povus ŝpari iajn sumojn kaj oni devus nur minimume altigi la kotizojn. Oni argumentis, ke la Esperantistoj ĝenerale estas malriĉaj kaj ke, tial, grava altigo de la kotizoj kaŭzus grandajn perdojn de la membraro.

La aliaj—konsentante pri la relative malgrandaj financaj rimedoj de la Esperantistaro—havis tamen pli da fido je la Esperantistaj komprenemo kaj konscio. Plue, ŝparado je la eldonaĵoj kaŭzus—laŭ tiu koncepto—ankoraŭ pli grandajn perdojn ĝuste de tiuj membroj, kiujn la movado pleje bezonas ; de la personoj, kiuj profunde amas Esperanton kaj kiuj deziregas, ke U.E.A. estu en sia agado digna de la nomo, kiun ĝi portas !

Post longa diskutado, iom hezite, oni fine ĉiuvoĉe decidis, ke la novaj kotizoj estos 7ŝ. 6p. (MJ), 20 ŝil. (MA), 25 ŝil. (MS), kaj £20 (Dumviva M).

En la nuna momento ĝi estis la sola serioza solvo, kiu ebligos kaj la regulan aperigadon de almenaŭ 32-paĝa gazeto, kaj la pluan publikigadon de la Jarlibro en la ĝisnuna formato, kaj la sanigon de niaj financoj.

Krome, tiu solvo liberigos niajn gvidajn organojn de la senĉesa temporaba zorgado pri plej bazaj financaj kaj administraj aferoj. Atinginte, fine, ke la kotizoj pagu la eldonaĵojn kaj la plej necesajn administrajn elspezojn—afero, kiun nepre devas atingi ĉiu organizaĵo—oni povos doni multe pli da energio al la laboro kaj por la disvastigo de

Esperanto, kaj por la riĉigo de la Internacia Lingvo per nova kultura enhavo, kaj por ĝia ĉiam pli vasta praktika aplikado.

Sur tiu finance sanigita fundamento oni povos kaj devos ankoraŭ multon konstrui. U.E.A. jam planas diversajn novajn aktivecojn, el kiuj la starigo de science bazita Centro de Dokumentado kaj Informado, ĵus decidita en Munkeno, tute certe multe kontribuos al gravigo de nia movado en mondaj kadroj. Estas sendube, ke por tiuj tute specialaj celoj troviĝos ankaŭ apartaj financaj fontoj: ordo en la financoj kaj bona funkciado kreas konfidon. Oni ankaŭ memoru, ke bona volo kaj oferemo ĉiam provokas oferemon ĉe la aliaj, ke unu sukceso ofte kaŭzas la alian, ke dinamismo ĉiurilate kuraĝigas!

Fine, ankoraŭ io:

Kiam oni estas membro de tia organizaĵo, kia estas U.E.A., oni pli deziras doni, ol esperas ricevi. Ni

subtenas U.E.A. antaŭ ĉio tial, ĉar unuigitaj en ĝi ni estas pli fortaj, ĉar pere de ĝi ni pli facile realigas nian idealon, ĉar U.E.A. estas la unua taĉmento, kaj ĉar ĝi devas ĉiam pli fariĝi vera armeo en la nobla lukto por la Internacia Lingvo.

La situacio sur la kampo de internaciaj rilatoj estas hodiaŭ tia, ke—se ne okazos iu nova katastrofo—oni povas kun multe da verŝajno antaŭvidi, ke la sekvantaj 10–15 jaroj estos decidigaj por nia afero. Tial ni devas urĝe pretigi nin por novaj taskoj. U.E.A. povos sukcese plenumi sian rolon nur se ĉiuj Esperantistoj plenumos la sian. La unua paŝo estas: definitive sanigi la financojn kaj tiele malfermi la vojon al plua progresado.

Ni fidu je niaj propraj fortoj! Per tuja pago de la novaj kotizoj por la jaro 1952, per amasa varbado de novaj membroj, ni pruvu la korektecon de la ĵusa decido!

Tiuj, kiuj ne pagis la kotizon por 1952, trovos en la nuna numero formulon kun informoj pri la novaj kotizoj. Pagu NUN por 1952, kaj vi multe helpos nin.

Internacia Konkurso, 1951

Stato je 31a de Aŭgusto 1951

Lando	Kvoto	Poentoj	%	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	400	645	161.2	15. Hispanujo ..	1100	1100	100.0
2. Brazilo ..	2500	3857	154.3	16. Svedlando ..	5300	5236	98.8
3. Portugalujo	600	925	154.1	17. Danlando ..	2800	2665	95.2
4. Sud-Afriko ..	250	340	136.0	18. Francujo ..	5700	5401	94.7
5. Germanujo ..	2400	3180	132.5	19. Aŭstralio ..	900	820	91.1
6. Finnlando ..	2000	2640	132.0	20. Nov-Zelando	800	700	87.5
7. Italujo ..	1700	2050	120.6	21. Kanado ..	250	215	86.0
8. Izraelo ..	300	360	120.0	22. Nederlando ..	5000	4240	84.8
9. Norvegujo ..	1400	1569	112.1	23. Usono ..	3000	2413	80.4
10. Belgujo ..	2100	2343	111.6	24. Argentino ..	800	640	80.0
11. Japanujo ..	800	875	109.4	25. Irlando ..	250	190	76.0
12. Urugvajo ..	250	265	106.0	26. Islando ..	500	330	66.0
13. Svislando ..	1400	1445	103.2	27. Aŭstrujo ..	1000	645	64.5
14. Britujo ..	12000	12248	102.0	28. Kubo ..	250	145	58.0



Tra la Mondo Esperantista

(raportoj mallongigitaj)



Tutmonda Junular-Organizo

**7-a Kunveno, en Haarlem, Nederlando
26/7—2/8**

Partoprenis la kunvenon ĉirkaŭ 280 gejunuloj el 15 landoj. En la malferma vespero, kiu havis apartan etoson, okazanta subĉiele en belega parko apud unu el la kongresejoj, salutparolis la prezidanto, reprezentantoj de la diversaj landoj kaj delegitoj de pluraj organizaĵoj, i.e. S-ro P. Moen, Ĉefdelegito de U.E.A. en Nederlando. Tre ŝatata estis la originala maniero laŭ kiu atingis nin saluto de s-ro Raymond Schwartz—per registra aparato, kiu disaŭdigis lian voĉon al la ĉeestantaro.

Kiel ĉefajn erojn en la programo ni menciis la oficialan akcepton de la Urbestro de Haarlem en la antikva urbdomo kaj festvesperon kun prelegoj de S-ino J. Isbrücker kaj de S-ro Andreo Cseh.

Por la ordinara junulo la diversaj ekskursoj estis inter la plej interesaj aferoj: al la mondfama fromaĝvendejo en Alkmaar, al la marbordurbo Bergen, al Volendam kaj al Amsterdam. Kvankam la karaktero de la T.J.O.-kunvenoj ĉiam estas pli festa ol labora, tamen okazis pluraj interesaj diskutoj. Elektiĝis nova estraro (konsistanta nur el gejunuloj). Oni elektis Danujon kiel kongreslandon 1952, parte pro ĝia favora situo “sur la vojo al Oslo”. La loka gazetaro dediĉis dum la semajno plurajn artikolojn al la kunveno:

ankaŭ okazis pri ĝi ok-minuta radioelsendo de la stacio Hilversum.

S.T. kaj H.V.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

23-a Kongreso, München, 4-11/8

Ĝi okazis sub la honora protektanteco de Lia Episkopa Moŝto D-ro Johannes Neuhäusler. Aliĝis 160 el 11 landoj. Dimanĉe ĉirkaŭ 1500 personoj ĉeestis diservon por la katolikaj kongresanoj de la 36-a U.K. en la universitata preĝejo St. Ludwig. Pastro A. J. Beckers (Belgujo) predikis pri la tasko de la universala katolika eklezio. Pri la religiaj kantoj de la opera kantisto Carl August Kohler (München) ĉiuj estis entuziasmigitaj. Oni legis salutleteron de Lia Kardinala Moŝto Theodor Innitzer (Wien).

La solena malfermo okazis lundon en la Universitato. Kaplano dipl.-esp. Ludwig Thalmaier, la organizanto de la kongreso, voĉlegis saluttelegramon de Lia Kardinala Moŝto Josef Frings (Köln), prezidanto de la germanaj episkopoj. Sekvis salutleteroj de 4 ĉefepiskopoj kaj de 8 episkopoj. Poste parolis la reprezentantoj de la ĉeestantaj landoj. La kunveno sendis saluttelegramon en Esperanto al Lia Papa Moŝto Pio XII-a kun la promeso uzi Esperanton laŭ la intenco de la beata Papo Pio X-a, kiu vidis en Esperanto valoran ilon por gardi la

unuecon de la katolikoj de la tuta mondo.

Dum la semajno okazis diversaj diservoj kaj ekskursoj. Merkredon estis en la universitato referatoj : parolis L.G.C. de Jong (Nederlando) pri la problemo *Elmigrado kaj Esperanto* kaj Max Mielert (Germanujo) pri la temo *Ĉu mondhistorio havas sencon?* Vendredon okazis la ĝenerala kunveno de IKUE. Oni priparolis organizajn problemojn, fiksas novajn statutojn, elektis Prezidanton (Pastron A. J. Beckers), ĝeneralan estraron kaj ĉefestraron. Oni decidis laŭ ebleco aranĝi la sekvontajn internaciajn katolikajn Esperanto-kongresojn en la kadro de la Universala Kongreso, sed ne ĉiujare.

L. Thalmaier.

Sennacieca Asocio Tutmonda

Kongreso en Stockholm, 28/7—4/8

Partoprenis la kongreson de S.A.T. ĉirkaŭ 600 anoj el 12 landoj. Tri laborkunsidoj okupiĝis pri organizaj demandoj, raporto de la plenumkomitato, Literatura Komitato kaj ceteraj aferoj. La kongreso akceptis jenan rezolucion :

La 24-a Kongreso de SAT, akceptinte unuanime la raportojn de la Plenumkomitato kaj de la ceteraj asociaj instancoj, deziresprimas ke ili daŭrigu sian laboron laŭ la samaj principoj. Pro la militpsikozo kaŭzita de la potenco kaj ĉiuflanka rearmado, la kongreso apelacias al la tutmonda organizita laboristaro kunagadi por malebligi novan militon. Nek la diplomatoj, nek aliaj registaraj instancoj, kapablis eviti pli fruajn militojn, kiuj detruis grand-skale kulturajn kaj precipe laboristajn instituciojn, ne parolante pri okazigita persona malfeliĉo en multnombraj familioj. La kongreso opinias aktuala, ke senkonsidere al politike diferencaj

tendencoj la sindikataj mondorganizaĵoj celu efikan kunlaboron por energie malhelpi la eksplodon de nova mondkatastrofo.

La 25-a Kongreso de SAT okazos en Düsseldorf, Germanujo, 1952.

S.A.T.

Internaciaj FERIAJ Kursoj

Helsingør, Danlando, 21—28/7

Ĉeestis 120 personoj el 11 landoj, la plej multaj el Danlando, Svedujo, Norvegujo kaj Finnlando. El Nov-Zelando ĉeestis S-ino Patricia De Cleene, kiu vizitis Skandinavion dum la pasinta jaro farante prelegojn en Danlando, Svedujo kaj Islando.

La aranĝo en Elsinoro estis bonega, ĉiuj ĝuis plengrade la 7-tagan ferion en vere Esperantista atmosfero. Antaŭtagmeze oni ĉeestis la lecionojn de S-ro Morariu (prepara kurso por Cseh-metodaj geinstruistoj), de S-ino Major (konversacia), de F-ino Ida Christensen (daŭriga) aŭ la infankurson de S-ro P. Jørgensen. Posttagmeze oni faris ekskurson al kastelo Kronborg, al Helsingborg en Svedujo, kaj al la kasteloj Fredensborg kaj Frederiksborg. Ankaŭ banekskursojn al la proksima banstrando oni faris. Vespere estis prelego de F-ino M. Noll, internacia balo, koncerto, kaj sorĉprezentado de nia samideana magiisto Lisbjerg.

En la venonta somero la feriaj kursoj okazos 25/7—1/8, do tuj antaŭ la kongreso en Oslo, tiel ke ĉiuj kursanoj povos komune iri de Helsingør al Oslo. Gvidontoj de karavanoj estas petataj frutempe anonci sian karavanon, kaj ni petas, ke multaj karavanoj alvenu al Helsingør, ĉar ja tamen multaj iros tra nia lando por atingi Oslo. La tagoj en Helsingør valoras tiun 7-tagan halton.

L.F.

Internacia Ferio-Semajno

Konstanz, Germanujo, 28/7—4/8

Partoprenis la aranĝon ĉirkaŭ 110 el 14 landoj. Matene kutime okazis la perfektiga kurso; miregis min kiel populara ĝi estis. Kiam oni parolis pri proponata venontjara antaŭ-kongresa semajno en Svedlando oni volis ke okazu ĉe ĝi ankaŭ perfektiga kurso.


En la posttagmezoj kutime okazis ekskursoj al diversaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo. La vetero estis varmega, eĉ tropika, kaj mi ne memoras eĉ unu guton da pluvo. La ĉielo ĉiam estis helblua kaj la akvoj de la lago Bodensee simile helbluaj. Inter la ekskursoj estis unu al Bregenz

(Aŭstrujo), kie ni supreniris monton per ŝnurvagonaro; alia al la insulo Mainau, kie ni vidis kreskantaj subtropikajn fruktojn, kaj al Unteruhldingen kie ni vidis la tiean prahistorian surfostan domaron; alia al Schaffhausen (Svislando) kie ni rigardis la Rejn-an akvofalegon . . . kaj kie la sinjorinoj multe butikumis. En la vesperoj okazis pluraj distraĵoj, inkluzive de vizito al opereto kaj festvespero kun folkdancoj.

Organizita de la ĉiam energia, pacienca kaj rimedoplena S-ro Schmidt, ĝi estis granda sukceso. Korajn dankojn al li pro neforgesebla semajno.

B. J. Broadway.

Konstanz, Germanujo (kun danko al la Urba Oficejo, Konstanz)



Internacia Pedagogia Seminario**Kochel am See, Bavarujo, 26/7—4/8**

Fakaj kunvenoj estas necesaj por detala pritraktado laŭ diversaj vidpunktoj de profesiaj temoj. Tia kunveno okazis antaŭ la 36-a U.K., kiam 21 geinstruistoj el Britujo, Francujo, Germanujo kaj Nederlando alvenis je la Georg v. Vollmar Schule en Kastelo Aspenstein, belege situita sur monteto, kun bone ekipita prelegĉambro, sunaj terasoj kaj amikaj geestoj. (Samtempe okazis kurso por geinstruistoj komencantaj, vigle gvidita de S-ro Korte.)

La laboro de UNESKO lastatempe ofte koncentriĝas en seminarioj, kie malgranda grupo studas elektitan temon. Nia Seminario agis plejparte (senintence) laŭ tiu maniero. Nia ĉefa temo estis *Esperanto ĉe la Instruistoj kaj en la Lernejoj*.

S-ro Kröber (Germ.), F-ino Nixon (Brit.), S-ro Korte (Ned.), kaj F-ino Dedieu (Franc.) prezentis bildon de la movado en siaj respektivaj landoj. Aliaj aferoj pritraktitaj estas: la principoj de instruista organizaĵo; la loko de Esperanto en lernejoj; la apliko de Esperanto en ekzamenoj de infanoj por pli altaj lernejoj; lerneja kaj instruista gazetoj; la sintenado de instruistaj fakasocioj al Esperanto; la diversspecaj 'someraj lernejoj'; 'lernejaj kooperativoj'; presarto en la lernejo; kaj infana vortaro (komparo de tiu en *Sub la Verda Standardo* kun 500-vorta listo de angla instruisto, k.t.p.)

Vizitis nin reprezentanto de la pedagogia revuo *Der Lehrer und die Schule* kaj aliaj.

Ni ekskursis en rave bela distrikto kaj amuzis nin diversmaniere. Ĉion bonhumore kaj trankvile gvidis S-ro Kröber, la Prezidanto de la Germana

Instruista Sekcio, al kiu ni ŝuldas kaj dankas. Ĉi tiu unua internacia seminario nepre estu nur komenco.

V.C.N.

Internaciaj Someraj Kursoj**Soesterberg, Nederlando, 27/7—2/8**

Ĉeestis ĉirkaŭ 90 el 6 landoj. Matene okazis la kursoj, kies gvidantoj estis S-ro Th. v. Gindertaelen, A. J. Kalma kaj A. Weide. Posttagmeze oni kutime faris esplorojn de la belaj ĉirkaŭaĵoj, ĉu bicikle ĉu aŭtobuse.

Vespere la ĉeestantoj provizis al si diversajn distraĵojn: estis muzikistoj kaj kantistinoj; okazis lumbild-prelegoj, de S-ro Makkink pri birdmigrado kaj de S-ro Zondervan pri la Sekigo de la Suda Maro; S-ro Magnusson el Islando rakontis pri sia lando.

Entute sukcesplena aranĝo, kun bela vetero kaj agrablaj kunuloj, kiu donis al la multaj partoprenintoj novan energion, necesan por daŭrigi plenkuraĝe la pacan batalon.

A.J.K.

Aŭstrujo

Landa Kongreso: Okazis 28 Julio—2 Aŭgusto en Innsbruck. Ĉeestis pli ol 130 Aŭstroj kaj 36 eksterlandanoj (el 7 landoj). Okazis multaj fak-kunsidoj (fervojistoj, katolikoj, laboristoj, UEA-anoj, SAT-anoj, k.a.) kaj la Jarkunveno de A.E.F.

Francujo

Vintra renkontiĝo: Okazos de la 23 Decembro 1951 ĝis 2 Januaro 1952 en Fontcouverte, Savojo, aranĝata de G.E.E. por skikurantoj kaj montaramantoj. Informoj de E. Bidoit, Instruisto, C. C. Suippes (Marne) Francujo (aldonu int. rpk.) Enskriboj ĝis 20 Oktobro.

Johan Hammond Rosbach :

La urbo kun la granda koro

Facile atingebla per ŝipo, aeroplano, vagonaro kaj aŭtomobilo, la norvega ĉefurbo prezentas al la vojaĝanta mondo ĉion, kion turistoj deziras de vizitata grandurbo. Kvankam situanta en la sudo de nia longega lando, Oslo estas ne nur nia ĉefurbo, sed fakte ankaŭ la vera centro de Norvegujo. Kaj kvankam situanta en la mezo de fekundaj agrikulturaj distriktoj, ĝi situas ĉe la maro, kaj havas bonegan havenon, kiun oni atingas post 100-kilometra vojaĝo tra la trankvila kaj mallarĝa Oslo-fjordo, kiu neniel fanfaronas pri montegoj kaj sovaĝa naturo. La haveno de Oslo estas unu el la plej viglaj havenoj en Eŭropo, kion oni komprenas ankaŭ, kiam oni ekscias, ke la urbo Oslo posedas pli da ŝipoj ol tuta Danujo !


Ankaŭ en la urbo mem la trafiko estas tre vigla. Kopenhaganoj, kiuj scias lerte majstri siajn biciklojn, ofte konfuziĝas pro la trafiko en la stratoj de la fratina ĉefurbo, kiu ja ne kiel

Kopenhago strabas al la milioncifero, sed kiu devas kontentiĝi pri la duono. Jes, la trafiko estas vere granda kaj vigla ; sur la stratoj veturas aŭtomobiloj de ĉiuj mondpartoj, kaj neniu osloano miras renkontante kolororiĉe vestitajn hindojn sur la trotuaroj. Sed la trafiko ankaŭ ŝajnas des pli granda, ĉar Oslo estas malnova urbo kun stratoj, kies arkitektoj neniam revis pri tia trafiko. Oslo tial ankaŭ havas malfacilegajn trafikproblemojn—kaj ankaŭ la plej modernan trafiksignalaron.

Sed ne ĉar la nutroportantaj vejnoj de la urbo estas tiom troŝargitaj, la urbo kvazaŭ malsanulo ricevis la nomon : la urbo kun la granda koro. La granda koro de la osloanoj montriĝas je iliaj gastamo kaj afableco. Venu al Oslo, kaj vi ekŝatos la osloanojn ! (Mi kuraĝas diri tion, ĉar mi mem ne estas osloano, sed dum deko da jaroj spertis la bonajn konsekvencojn de la menciita granda koro !)

Oslo :

la ĉefstrato Carl Johans gate, kun la parlamentejo maldekstre kaj la reĝa palaco ĉe la fino.



Sed kongresanoj venos al Oslo ne nur por labori. Kongresanoj, esperantistoj deziras vidi la mondon kaj ekkoni la popolojn—ne nur pro sia propra plezuro, sed same multe por fratigi la popolojn per tiuj vizitoj al la kongresurboj. Kaj Oslo dum centoj da jaroj estis la kultura centro de malgranda popolo. Oslo estas la urbo, kie Henrik Ibsen vivis kaj verkis ; Oslo ankaŭ estas la urbo, kie Fridtjof Nansen estis universitata profesoro. Oslo estas la urbo, kie la mondfamaj sportistoj vetkuras kaj vetsaltas—kaj la nomo Holmenkollen estas konata en ĉiuj landoj de sportemaj homoj. En Oslo estas la belegaj ŝipoj el la vikinga tempo, en kiuj pratempaj reĝinoj estis emtombigataj kun siaj riĉaĵoj, kaj kiuj antaŭ nemultaj jaroj estas retrovitaj en bonega stato. Jen ili staras nun kiel simboloj ne nur pri norvegaj kuraĝo kaj entreprenemo, sed ankaŭ pri norvegaj inĝeniera kaj marista artoj pli ol miljaraj. De la plej malnova parto de la urbo kaj ties multaj preĝejoj restas nur ruinoj, ĉar la urbo havis maldolĉan sorton. Sed 700-jara kastelo neniam konkerita fiere tronas super la haveno, la kastelo Akershus, kiu vidis tiom da sango kaj sufero ne nur dum la mezepoko, sed ankaŭ dum la lastaj militjaroj, sed kiu estas nun nek fortikaĵo nek malliberejo, sed vizitebla malnova palaco. Kaj kiel ĝia plej proksima najbaro—ankaŭ kun vizaĝo al la haveno kaj al la alvenantaj ŝipoj—la varmruga brika urbdomo bloke masivas kun siaj du kubaj turoj kaj la ora horloĝego.

Tiu urbdomo—ankoraŭ ne finkonstruita—estas la fiero de ĉiuj osloanoj, ankaŭ de tiuj, kiuj obstine asertas, ke ĝi ne plaĉas al ili. De gustoj oni ne povas diskuti—sed oni

devas tamen ĉial admiri la arton, kiu estas tiom malavare aplikita por dignigaj ornamoj de la masivaĵo. La plej lertaj pentristoj kaj skulptistoj de la lando montris tie la plejebelon de siaj artoj.

La alia granda diskutobjekto de la osloanoj estas la granda skulptaĵparko kreita de la skulptisto Vigeland, pordegoj el forĝita fero, ponto kun bronzaĵoj de nudaj homoj, viroj, virinoj kaj infanoj,—granda fontano portata de nudaj gigantoj, ŝtuparaj terasoj el helgriza granito, kaj kiel la krono sur ĉio, la blanka monolito, kiu montras la homan ekziston de bebo ĝis kadukulo. Bela aŭ nebela—pri tio ĉiu rajtas juĝi laŭ siaj gusto kaj prefero. Sed neniu ne povas admiri tiun artparkon, kies similon oni nenie trovas.

La urbo de la 37-a UK estas grandurbo, sed tamen ne grandega. Ĝi estas kvazaŭ grandurbo meze en la kamparo. Vi povas promeni tutan tagon sen veni al la limo de la urbo. Kaj tia promenado estas rekomendinda, ĉar ĝi montros al vi la ĉarmojn de la norvegaj kampoj kaj la idiliojn de la norvegaj grandarbaroj.

Por eviti ĉiajn miskomprenojn mi devas aldoni, ke Oslo tute ne situas ĉe Norda Polusa, ke meznokta suno ne estas en Oslo, nek glaciursoj en la stratoj. La klimato estas bona kaj la somero estas agrable varma ; oni povas tute libere, senĝene kaj senpage sin bani en la urbo, kiu havas bonajn ĉemarajn banlokojn, kie la akvo dum la tuta somero havas pli ol 20 Celsius-gradojn.

Kaj fine : se vi kredas, ke Oslo estas fora, tre fora urbo, bonvolu trovi vian mapon kaj mezuri la distancon—kaj kompari tiun distancon kun la distanco al urboj, kiujn vi supozis pli proksimaj !

Niaj Kunlaborantoj

**Ragnvald Rian, Honora Membro de U.E.A.,
Ĉefdelegito en Norvegujo**

RAGNVALD RIAN naskiĝis 14 sept. 1891 en Skogn, do li ĵus atingis sian 60-an jaron. Kiel 15-jara knabo li ricevis kiel donacon en sia "Konfirmacio-tago" esperantan lernolibron, kaj de tiu tago li esperantiĝis. Tio estis en 1906.

Du jarojn poste li gvidis sian unuan kurson en Levanger, kaj estas neeble ĉi tie nomi ĉiujn kursojn, kiujn li gvidis. Kiel plenkreskulo li transloĝis al Trondhejmo kaj en la loka grupo—Grupo Esperantista de Trondhejmo—Rian dum la jaroj okupis ĉiujn oficojn, jes fakte, oni povas diri, ke li dum la malhelaj tagoj estis la esperantomovado en Trondhejmo. En la fino de la 1920-aj jaroj, dum la movado en Norvegujo trapasis malfacilan tempon, Rian verkis kaj eldonis la "Leterkurson por la I.O.G.T.-anoj" (La Bontemplanoj) en Norvegujo (1923) kaj sian unuan norveg-esperantan vortaron (1928). Tiu lasta estas bone konata inter la norvegoj, sed bedaŭrinde ĝi estas elĉerpita. Kune kun s-ro E. A. Haugen, Rian nun laboras pri nova pli ampleksa vortaro norveg-esperanta. En 1949 la Esperanto-Eldonejo A/S en Oslo eldonis lian grandan esperant-norvegan vortaron. Ĝi estas unu el la plej ampleksaj en Esperantujo. Jam de la komenco Rian estas membro de la Loka Ekzamena Komitato.



Delegito de U.E.A. li fariĝis en 1913, kaj de 1935 li estas ĉefdelegito por Norvegujo.

Li estas Honora Membro de U.E.A. (1948) kaj de Norvega Esperantista Ligo (1948) kaj portanto de la norvega esperanta ordeno "Pro Meritoj" (Komandoro de la 1-a klaso) (1951).

Ekster la Esperantomovado Rian estas bone konata ŝakludanto kaj multjara membro de la internacia Bontemplana movado I.O.G.T. Laŭ profesio Rian estas komercisto en la fako vendado de fortepianoj, pianoj kaj orgenoj, kaj li mem estas tre bona pianisto kaj komponisto.

Ni gratulas kaj dankas al nia samideano, dezirante ankoraŭ multajn laborjarojn por nia komuna afero.

Pedro.

OSLO ATENDAS VIN : ALIĜU NUN

LA PANTEONO

de la Esperanto — Movado, Vieno

Memori la homojn kiuj sin distingis per kaj por io, estas honora devo socia. Tiu-ĉi honorigo fariĝas iatempe kaj ialoke kulto, kondamnata de racia menso. Kiel en ĉio homa, la ora mezo kaj la limigo estas malfacile realigeblaj.

Sub tiu-ĉi rezervo idea ni akceptu la iniciaton de fervora kaj nelacigebla, "Hofrat Hugo Steiner" en Vieno, kreinto de la Esperanto-Muzeo, instalita en la impona kastelo imperiestra, la fama Hofburg. La ideo de Hugo Steiner do estas, krei ejon, kie estas kunigitaj la portretoj de nia pioniroj. Eble la vorto Honor-salono sonus pli modeste ol la pompa Panteono, sed ni lasu tion !

Je la tria de Junio okazis la inaŭguro de tiu-ĉi kompletigo de la Esperanto-Muzeo. La solenaĵon antaŭiris meso, celebrita en Esperanto de Pastra Moŝto Georg Plank en la Minorita-Preĝejo. Partoprenis la solenon pli ol cent personoj. La salono rondforma kaj vasta laŭcele aranĝita prezentiĝis tute digne. La ceremonion malfermis la iniciatinto, skizante la evoluon de la ideo. Kiel honorgastoj ĉeestis kaj laŭvice parolis : Estinta ŝtatprezidanto, Wilhelm Miklas ; Sekcia ĉefo D-ro Chaloupka, (por la Kanceliero D-ro Figl) ; Sekcia Konsilisto D-ro Führing (por Ministro de Edukado, D-ro Hurdes) ; Prof. D-ro Sirk (por la rektoro de la Teknika Altlernejo) ; S-ro Kisser (por la ĝenerala Direktoro de la Nacia Biblioteko) k.a. La Estraro de U.E.A. delegis Redaktoron

Hans Jakob de Genève. Aro da saluttelegramoj kaj leteroj de eminentaj personoj el socia vivo de Aŭstrio estis legataj.

Fikspunkto de la salonego estas la belega oleo-bildo de D-ro Zamenhof, verko kaj donaco de artpentristo belga Archibald Bents el Gent-Gand. Grandaj tabuloj montras la nomojn de la protektantoj, mecenatoj, pioniroj de nia movado. La plano, ellaborita de Hugo Steiner estas taŭga, konformiĝas al la spaco kaj al la realeco. Por kompletigi ĉion necesas la kunhelpo de la Landaj Esperantistaj Organizaĵoj, kiujn la iniciatinto invitis partopreni je tiu-ĉi verko.

Speciala poŝta stampo memorigas tiun ĉi solenaĵon. Profitante la okazon, Estrarano de U.E.A. Hans Jakob akompanita de Hugo Steiner vizitis la Urbestron de Vieno, Generalon Theodor Körner, elektita kiel ŝtatprezidanto kaj la novan Urbestron de Vieno, aktivan Esperantiston Franz Jonas. Ambaŭ sin esprimis tre favore pri nia klopodado kaj certigis sian efektivan intereson. Restas kiel impresio, ke Vieno estas idea centro de Esperanto. Estas nia devo subteni tiun-ĉi kreaĵon kaj helpi al la vienaj samideanoj en la daŭra laboro por la Muzeo kaj la Panteono. Detalan raporton pri la inaŭguro de la Panteono oni trovas en la Informilo de la I.E.M., aliĝante kiel membro, sendante ses internaciajn respondkuponojn al Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I.



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas : S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.

Virina vivo en Indonezio

La domo : La domoj en Indonezio estas tre grandaj kun larĝaj kaj malfermitaj pordoj kaj fenestroj. Dum la tuta tago la suno devas kaj povas brili en la domojn ; la virinoj kaj ŝiaj infanoj ne povas vivi sen suno. La koloroj de la domoj estas verda kaj bruna, simila al la folioj kaj tero. En la domoj estas ĉambroj por manĝi kaj dormi, sed la plej granda ĉambro estas tiu, en kiu oni akceptas la gastojn. La indonezia popolo ŝatas gastojn kaj la tutan tagon venas kaj iras la gastoj.

Ĉiu domo havas ĝardenon. Tie la indonezia virino plantas florojn, sed ankoraŭ pli da legomoj kaj medicinaj herboj.

La manĝoj : En Indonezio oni manĝas rizon tri fojojn en la tago. Oni manĝas rizon kun legomoj, fiŝoj kaj viando. Estas ĉiam varmaj

manĝoj kaj oni aldonas multajn spicojn. La rizo estas tre seka, same kiel la viando kaj fiŝo. Supon oni ne kutimas manĝi ; oni ne trinkas alkoholon kiel bieron aŭ vinon. La indonezia popolo trinkas akvon, teon kaj kafon. Ankaŭ la foliojn de la kafo oni trinkas post sekigo kaj bolado en akvo. La kuirejo de la indonezia virino estas tre granda, ĉar multaj homoj manĝas en la domo. La venintaj gastoj restas ankaŭ por manĝi kun la familio. En la manĝtempo ĉiu persono en la domo devas partopreni en la manĝado.


La indonezia virino havas multan laboron, sed ankaŭ multajn helpantojn. La mastrino havas tri aŭ kvar servistojn, sed la tuta familio helpas en la laboroj. Kiam la virino edziniĝas, ŝia patrino donacas al ŝi la servistojn.

Rangkajo Chailan Sjamsoe
Datoe Toemenggoeng.

Recepto de la monato : (el Hindujo). *Raguto de Anaso*

Anaso. Servkulero da hakita zingibro, kapsiketoj, sukero, koriandro, 2 servkuleroj da hakita cepo, duona plentaso da vinagro, pinĉo da hakita ajlo, ¼ kilo. da kokoso kaj iom da salo.

Preparu la anason kaj tranĉu ĝin en pecojn. Raspu la kokoson. Boletu la anseron en la kokosa lakto dum 5 minutoj. Tiam fritu la pecojn kaj aldonu la aliajn ingrediencojn malgrande hakitajn, la sukeron, vinagron, kaj salon fine. Se oni uzas sekan kokoson, aldonu iom da akvo. Se oni uzas freŝan kokoson, flogigu ĝin kaj vaporumi ĝin, antaŭ ol aldoni ĝin al miksaĵo.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***La mondo ne havas atendejon :**
Maurits Dekker. Teatraĵo en tri aktoj. El ned. trad. F. Faulhaber. Eld. S.A.T., 21.5×14cm. 80 p. kun 8 ilustraĵoj, broŝ. prezo 5ŝ. 6p., afranko 3p.

Malofte aperas en Esperanta eldono teatraĵo vere leginda. Ĉi tiu estas tia. La temo estas aktuala : la atombombo. En la komenco ni renkontas iun generalon Greenway, reprezentanton de la ŝtato. De profesoro li postulas raporton pri Piradiumo, materialo kiu ebligas fabrikon de bombo multe pli efika, ol iu ajn ĝis nun konata. La materialon eltrovis la profesoro kaj lia filo James, sed tiu, ekkonsciante la teruran sorton, kiu falos sur la homaron, se Piradiumo estos uzata por celoj militaj, decidas ne plu kunlabori kun la patro. Mi ne skizos la elvolviĝon de la intrigo, tamen fine la patro devas fronti la demandon, ĉu sekvi la filon aŭ la generalon.

La minaco de la atombombo koncernas ĉiun seriozan homon, sed eĉ tiu, kies sinteno al tio estas struteca, legos la verkon kun streĉa atento, ĉar malgraŭ la moderneco de la temo, ĝi estas teatraĵo laŭ la tradicio de la antikva dramo, en kiu la roluloj ne reprezentas individuojn, sed personigas abstraktaĵojn—filo kaj generalo estas Homo kaj Ŝtato, la profesoro vi kaj mi. Estas kontentige ekscii, ke la sursceneja prezentado jam ricevis bonan akcepton en pluraj landoj.

La nomo de la tradukinto, F. Faulhaber, garantias lingvaĵon de alta kvalito. Nur tie kaj tie mi preferus alian formon : *konsideras* (opinias, rigardas) ; *duona horo* (horduono) ; *ĝis kiam* (kiam) La libro estas bone presita, la kovrilo plaĉas al la okulo, kaj estas ĉiel rekomendinda. En eldonaĵo de S.A.T. mi trovis iom strange, ke oni lasas la antaŭnomojn de la roluloj en nefonetika Angla formo.

C. D. A. Capp.

Volo kaj vojo de Saarlando.
Parolado de la Ministro-prezidanto Johannes Hoffmann kaj de la Parlamentprezidanto Peter Zimmer en la 100-a kunsido de la Saarlanda parlamento, la 6-an de Aprilo 1951. 20 paĝoj, 21×14.5 cm. Eldonita de la Informoficejo de la Saarlanda Registaro, Saarbrücken. Interesuloj povas ricevi la broŝuron senpage, skribante al Informationsamt der Regierung des Saarlandes, Schillerstrasse, Saarbrücken, Saar.

Jam ekzistas aro da politikaj presaĵoj en Esperanto, sed malmultaj estas tiuj eldonitaj de registaro. La jena broŝuro, kies kovrilo montras la blazonon de la lando, estas unu el tiaj traktaĵoj. Ĝi prilumas problemon vidatan de la respondecaj politikistoj saarlandaj. Ĝi estas respondo al aro da riproĉoj kaj kulpigoj faritaj al ĉi tiuj homoj, akceptintaj heredaĵon ne-enviindan. Vidiĝas el tiu ĉi legaĵo la realisma prijuĝo de la vera situacio de venkita regno kaj de

Londona Kooperativa Societo utiligadas Esperanton

Dum la Londona antaŭkongreso de Esperanto en Aŭgusto 1949 la Londona Kooperativa Societo bonvenigis hejmlandan kaj eksterlandan Esperantistaron per belegaj sepkolore presitaj grandformataj afiŝoj. La sama bildo ornamis en unutona koloro la Esperantlingvan broŝuron pri la agado de la milionmembra firmego. Nunjare, okaze de la Festo de Britujo, la kooperativo afable sin turnis al internacia publiko per alia afiŝo de sama grandeco (75 × 50 cm.)

V.S.



daŭrigo (de p. 252)

grava parto el ĝi. Enestas kelkaj veraĵoj, kiuj certe ne plaĉas al iuj pro la malkaŝemo. La blazono de Saarlando montras super la ŝildo ponton. Ĝi eble estas la paciga ponto inter la du regnoj eterne militintaj, Francujo kaj Germanujo.

La traduko estas bona, farita de spertaj samideanoj, A. Omlor kaj S-ro Schenkel. Eta rimarko: Nazi-socialistoj estas la akceptita formo, sekve ne "Naciaj socialistoj", kio estas io tute alia.

H.J.

Enigma Konkurso N-ro 61

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 59.

N-ro 130 : Vivu Esperanto. Ŝlosilvortoj : ventriklo - inkognito - vermiĉelo - ultramaro - ekspluati - spektaklo - poligloto - elevatoro - redaktoro - areometro - nostalgio - tamburino - ortodoksa.

N-ro 131 : Sango komuna reciproke sin altiras. Ŝlosilvortoj : listo - kalio - banto - glano - tropo - falko (el flano) - rosti - lampo - duono - lango - astro - trefo - kesto - citro - stebi - spiko - sabro - karoo - kvita - poreo - ritmo - tiaro - lundo - aveno - orelo - lakto - tinko - trans - marto - sekto.

Enigmo N-ro 133.

R . . * . M . N . O	Metu la ĉi-subajn litergrupojn en
. E . . * . R . K .	la figuron, tiel ke ekestas 26
R . V . . * . O . O	naŭliterajn vortojn. La literoj
. O . A . . * . C .	sur la zigzaga kruclinio formas
S . I . . * . R .	esprimon el la proverbaro de D-ro
. L . . * . T . O	Zamenho ⁴ . De ĉiu vorto tri
A . . * . R . F .	literoj jam troviĝas sur la bona
. . * . M . N . I	loko.
D . . * . E . R .	ADO - AKO - ALA - ALA - ALI -
. K . . * . K . O	ALI - AME - AME - ANT - ANT -
D . K . . * . I .	APO - ARA - ATE - ATO - BAS -
. N . I . . * . O	CIO - DEK - DEK - DIP - EAD -
M . R . . * . D .	EBI - EKJ - EKS - ERE - ERO -
. A . . * . A . O	GIO - HOR - IGL - IPR - ISE -
H . . * . K . P .	KTO - LAM - LOM - MAR - MED -
. . * . G . O . O	MEL - MET - NCO - NDI - NKT -
D . . * . M . T .	NTO - NTO - OFO - OKA - OKD -
. O . . * . O . O	OME - OMO - ONO - OPO - ORA -
M . T . . * . M .	ORO - OSK - OTO - OTO - PAS -
. E . T . . * . A .	PAS - PER - POL - PSO - REC -
O . D . . * . R .	REK - RIV - ROJ - RON - SFI -
. E . . * . N . O	SMO - STR - STR - TAR - TER -
M . . * . I . N .	TIK - TIN - TOR - TRA - TRO -
. . * . N . U . O	TRO - ULO - VER -
S . . * . E . I .	

Enigmo N-ro 134. Ĉiutage S-ro X. revenas hejmen per la vagonaro. Je

la sesa horo precize li eliras la stacidomon. Lia ŝoforo iom pli frue forlasis la domon kaj alvenas ankaŭ precize je la sesa ĉe la stacidomo, kie S-ro X. enaŭtomobiliĝas por hejmenveturi. Iun tagon S-ro X. alvenas precize je la kvara. Ĉar li ne povis averti sian ŝoforon, lia aŭtomobilo ne estis ĉe la stacidomo, kaj S-ro X. marŝis hejmen kun rapideco de po 5 kilometroj en horo. Lia ŝoforo foriris al la stacidomo je la kutima horo, renkontis survoje S-ron X., kiu enaŭtomobiliĝis kaj plu veturis hejmen, kie li alvenis kvaronhoron pli frue ol kutime. Supozu, ke la rapideco de la aŭtomobilo ĉiam estas konstanta, kaj ke S-ro X. ne perdas tempon, enirante la aŭtomobilon, kiom estas la rapideco de la aŭtomobilo? (Argumentado bezonata).

Ensendita de S-ro A. v. d. Velde.

Enigmo N-ro 135. Perditaj proverboj. Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn tiel, ke vi trovos esprimojn en la Zamenhofa Proverbaro. ĉbi - eki - ene - lil - nefl - oĝa - rdo - sti - ugas.
ana - etra - lla - luu - nĉit - ond - one - pan - pec - reg.
ass - enĉ - enc - eso - flu - iĝi - kom - oce - ono - som - spr.
abu - aco - ama - asg - dai - del - est - isl - nte - noj - ran - rsp - ŝoĝ.
ĉan - gas - gri - ĝel - ian - kal - nie - onni - ons - tan - tek - teo - umn.

Gaja Leganto per Esperanto

56 p. da anekdotoj, ludoj, enigmoj : 1ŝ. 2p. aŭfrankite (3 rpk.)

Mendu ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

P. E. Schwerin

La 36-a U.K. en München

La Komitataj Kunsidoj

Ĉeestis pli bona proporcio de la Komitato ol okazis dum la lastaj jaroj. Pro la malsano kaj foresto de la Prezidanto, S-ro Malmgren, prezidis la Vic-Prezidanto, D-ro P. Kempeneers. En la nuna jaro oni provis novan aranĝon kaj dividis la Komitatanojn en kvin komisionojn laŭ la fakoj pri kiuj respondecas la Estraranoj. Tiuj komisionoj unue pritraktis la diversajn punktojn de la tagordo, kiuj rilatis al iliaj fakoj, kaj poste prezentis siajn konkludojn al la tuta Komitato, kiu diskutis ilin kaj faris decidojn. Tiu aranĝo pruviĝis tre praktika.

La Komitataj kunsidoj daŭris multajn horojn kaj kompreneble multaj eroj en la tagordo rilatis al normala administrado kaj ne havas apartan intereson por la ordinara leganto. Kelkaj decidoj tamen estis interesaj kaj pri tio mi donas mallongan resumon.

Financoj. La spezoj kaj bilancoj por 1950 estas aprobitaj kaj la Komitato decidis plialtigi la kotizojn de individuaj membroj por 1952 (vidu paĝon 241).

Honoraj Membroj. La Komitato akceptis regularon pri la elekto de estontaj Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj, kaj tiu regularo aperos en la dua parto de la Jarlibro 1951. D-ron Edmond Privat oni elektis Honora Prezidanto; S-ron J. Saldanha Carreira, Honora Membro.

Propagandaj vojaĝoj. La Komitato rekomendas al ĉiuj kiuj preparas tiajn preleg-vojaĝojn, ke ili antaŭe

informiĝu pri la moralaj kaj propagandaj ecoj de la koncerna persono, sin turnante al U.E.A. aŭ al tiuj organizaĵoj, kiuj bone konas lin aŭ ŝin.

UNESKO. La Komitato dankis al S-ro Durrant pro lia bonega laboro dum la lasta jaro. (Ni esperas presigi resumon de la rezultoj en venonta numero de *Esperanto*.)

Centro de Dokumentado kaj Informado. La Komitato rajtigis al D-ro Lapenna komenci la realigon de tiu Centro, kiu povos eventuale multe helpi al la disvastigo de Esperanto.

La gazeto Esperanto. Pro la pli-altiĝintaj kostoj ŝajnas, ke la gazeto povos havi nur 24 paĝojn ĝis Decembro, sed kondiĉe ke la granda plimulto de la Membro-Abonantoj ĝustatempe renovigis siajn kotizojn por 1952 ĝi povos tiam denove enhavi 32 paĝojn. Diversajn proponojn pri ĝia enhavo oni diskutis.

Kongreskotizoj. Oni decidis pri aliigo de la Kongresa Regularo laŭ kiu la normalaj kongreskotizoj estos 35ŝ., 40ŝ. kaj 45ŝ., sed kun rabato 5ŝ. por individuaj membroj de U.E.A.

Universalaj Kongresoj. Oni diskutis diversajn proponojn pri la aranĝo de la Kongreso. La rezultoj de tiuj estos evidentaj en estontaj kongresoj.

Kelkaj dekoj da aliaj aferoj estas diskutitaj kaj pri tiuj la Landaj Asocioj kaj la Fakaj Asocioj ĝustatempe rekte ricevos informon.

C.C.G.

La Unua Sekcio

Preskaŭ 350 kongresanoj partoprenis la kunsidojn de la Unua Sekcio, kiam oni pritraktis la temon "Esperanto en la Edukado de la Plenkreskuloj". Laŭvice oni diskutis pri la kvin subsekcioj de la temo, nome, (1) kiel allogi ilin (2) kiel instrui ilin, (3) kiel reteni ilin (4) kiel enkonduki ilin al Esperanta Literaturo, kaj (5) kiel aktivigi ilin.

Venis multaj bonaj sugestoj pri la prepara laboro necesa por allogi plenkreskulojn :—gazetaj artikoloj, personaj kontaktoj, publikaj paroladoj, k.t.p.

Estis konsentite ke, por la sukceso de kurso necesas precipe, ne Esperantisto kiu flue parolas la lingvon sed homo kiu bone scipovas instrui ĝin.

Evidente en certaj landoj mankas malgrandaj kaj malkaraj Esperanto-vortaroj, kaj pri tiu punkto la anoj de la Unua Sekcio atentigas la koncernajn landajn asociojn.

La blinduloj petis pli da fakdelegitoj por blindaj Esperantistoj, por antaŭenpuŝi la movadon inter la nevidantoj.

La Dua Sekcio

Dank' al bonaj antaŭpreparoj, la laboro de la Dua Sekcio (Esperanto en Scienco kaj Tekniko) disvolviĝis sur tre alta nivelo. Ĉeestis 98 scienculoj kaj teknikistoj el diversaj landoj, inter kiuj ankaŭ Prof. D-ro Canuto, rektoro de la Universitato en Parma, Prof. D-ro Privat, Prof. Laurat, Prof. Waringhien, Prof. Sirk, D-ro Musella, Ing. J. R. G. Isbrucker (prezidanto de la Akademio), Prof. N. Markevic (reprezentanto de Munkenaj sciencaj institucioj), D-ro

Bormann, S-ro Keur (sekretario de la Sociologia Komisiono), k.a. Prezidis kaj faris la enkondukan raporton Prof. D-ro Ivo Lapenna. Protokolis S-ro Marinko Gjivoje, membro de I.S.A.E.

Post plurhora (dum du matenoj) detala esploro de la nuna situacio de Esperanto en scienco kaj tekniko, la Sekcio formulis siajn rekomendojn en aparta rezolucio, kiu estos dissendita al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj. La ĉefaj rekomendoj rilatas al starigo de sliparo pri la plej valoraj sciencaj verkoj tradukindaj aŭ resumindaj en Esperanto ; al provo funkciigi nian I.S.U. en du partoj, tiel ke la unua okazu ekster la kongreso en grava internacia universitata centro, kaj la dua kiel ĝis nun dum la U.K. : al fondo de novaj studentaj kaj intelektulaj kluboj kaj grupoj kun la celo havigi al I.S.A.E. pli larĝan bazon kaj al la scienca literaturo pli grandan legantaron. La Sekcio akceptis alvokon al la sciencisto de la mondo. Ĝi proponis kiel sian tagordon por la U.K. de Oslo du ĉefajn punktojn : (1) La laborkondiĉoj kaj la morala-intelekta pozicio de la scienculoj ; (2) La lingva problemo en la scienco.

Kiel aparta komisiono de la Sekcio kunsidis la Sociologia Komisiono. Prezidis S-ro W. A. Gething, raportis la sekretario S-ro C. I. Keur. La komisiono diskutis pri la difino de sociologio. Ĝi ankaŭ konstatis, ke kaj Esperanto kiel lingvo kaj la Esperanto-Movado estas ankoraŭ tro malmulte prilumitaj el sociologia vidpunkto, kaj ĝi proponis al la Sekcio apartan punkton de la tagordo por la U.K. en Oslo : La socia konsisto de la Esperanto-movado.

En la tre vigla kaj interesa diskuto partoprenis trideko da personoj.

La Tria Sekcio

Sub prezido de Prof. Lucien Laurat ĝi pritraktis vastan tagordon. Antaŭ ĉio oni pridiskutis la eblecojn pri starigo de listo de beletristikaj verkoj tradukindaj en Esperanton. Pri tiu punkto la sekcio akceptis rezolucion en kiu ĝi rekomendas ke antaŭ ĉio oni publikigu listojn de ekzistantaj, jam tradukitaj, verkoj, eluzantaj katalogojn de gravaj Esperantaj bibliotekoj. La sekcio plu rekomendis, ke U.E.A. starigu konstantan komisionon, konsistantan el almenaŭ po unu fakulo el ĉiuj landoj. La tasko de la komisiono estus elekti la tradukotajn verkojn, favorante precipe tiujn kiuj povus plialtigi la kulturan nivelon de nia movado. Fine la sekcio sugestis, ke en ĉiu lando la membroj de la komisiono elektu eltiraĵojn el sia landa verkaro por eventuala eldono de internacia antologio.

Apartan atenton dediĉis la sekcio al la starigo kaj funkciigo de teatra trupo. Ĝi konstatis gravajn malfacilaĵojn en la realigo de tiu plano. Tamen oni daŭrigos la esplorojn por starigi tian trupon en la baldaŭa estonteco. Fine, la sekcio rekomendis interŝanĝon de mallongaj 16 mm. kulturfilmoj. La proponoj kaj sugestoj de la sekcio estas pritraktotaj de la U.E.A. Estraro.

La Kvara Sekcio

La temo de la Kvara Sekcio estis Esperanto en la internacia trafiko kaj komerco. Prezidis S-ro P. Petit kaj la Sekretario estis S-ro G. C. Fighiera. La diskutado estis vigla kaj la Sekcio akceptis diversajn rekomendojn al la Kongreso.

Rilate al internacia trafiko ĝi konsideris necesa plimultigon de la nombro da Esperantistaj turistoj, ĉar nur se tio okazos oni povis atendi ke la hoteloj pli vaste uzu Esperanton. Ĝi rekomendis ke hoteloj kiuj uzas Esperanton havu specialan insignon por tion indiki. Ĝi pritraktis ankaŭ paŝojn necesajn por pliampleksigi la uzon de Esperanto en la polico, doganoj kaj fervojoj.

La Sekcio konsideris ke estus bone se en la programo de la U.K. estus specialaj prelegoj pri la historio, folkloro, artaĵoj kaj fabrikejoj de la urbo kaj lando en kiu ĝi okazas.

La Sekcio konstatis ke en la lastaj jaroj tre bone sukcesis pluraj karavanoj al eksterlando organizitaj de Esperantistoj, kaj konsideris tion plej efika propagando. Ĝi rekomendis la daŭrigon kaj pliampleksigon de tiaj aranĝoj, kaj faris rekomendojn al la Estraro de UEA. Ĝi rekomendis ankaŭ la organizon de Esperantaj kruzadoj, aŭ por Universala Kongreso aŭ kiel aparta aranĝo.

José Enrique Rodó

ARIEL

El hispana lingvo tradukis Manuel Fernández Menéndez. La unua Esperanta libro eldonita en Urugvajo

158 paĝoj : broŝ. 6ŝ. 6p., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

La Fakaj Asocioj

La Fakaj Asocioj raportis pri sia progreso dum la jaro en diversaj medioj—ĵurnalista, edukada, religia, junulara, kaj federalista. Ĝenerale la progreso estis kontentiga, tamen restas ankoraŭ multo farinda kaj farenda. La raportoj montris la intimajn kaj amikajn rilatojn inter la Fakaj Asocioj kaj U.E.A., kiuj certe alportos komunan profiton al ambaŭ. Al ĉiuj Fakaj Asocioj kiuj sendis raportojn (kies resumoj troviĝos en la Dua Parto de la Jarlibro) la Estraro de U.E.A. tre kore dankas.

Stenografia konkurso

Aranĝita de S-ro Hermann Korell, sekciestro de la stenografoj en la Germana E.A., okazis dum la kongreso stenografia konkurso. La sukcesintoj estis

(1) Nicola Minnaja (140 silaboj en minuto), kaj poste Hermann Korell (130), Eva Julin (80), Leo Lehmann (60), Adam Uebags (60), Rüdiger Eichholz (60).

Eĉ infanoj kongresis!

En la kadro de la kongreso ankaŭ la infanoj estis prizorgataj. El 50 ĉeestantaj infanoj loĝis dudek en speciala infana hejmo, kie ili ankaŭ kune manĝis. Ili vizitis muzeojn kaj vidindaĵojn, la botanikan kaj zoologian ĝardenojn, flughavenon kaj aviadilon. Ili partoprenis la tuttagan ekskurson kaj trovis ĉie, ĉe esperantistoj kaj neesperantistoj, grandan atenton pro la flue parolata Esperanto. La ĝemelinoj Malu kaj Mate Lanoux kaj la fratoj Joĉjo kaj Feliks Moravec apartenas al la plej bone konataj kongresinfanoj.

Belartaj Konkursoj

Poezio traduka : gajnis la premiojn (vidu p. 226)

1. Pastro J. Dinwoodie : *En la montoj* (Stevenson)
2. Pastro J. Dinwoodie : *Mortu la egaligulo* (Shirley)
3. William Auld : *La mamoj de Ĝura* (A. Young)

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Jurgens. Al Ges-roj V. Jurgens, en Kapellen, Belgujo, je la 29-a de aŭg., filino nomita Gabriella.

Koopmans. Al Ges-roj Koopmans-Schotanus, en Hilversum, Nederlando, je la 26-a de junio, filino Roelofke Maaike Benita.

Maertens. Al Ges-roj Maertens-Mallet, en Sint Kruis, Belgujo, je la 28-a de aŭg., filo Johan.

Monkiewicz. Al Ges-roj Monkiewicz, en Warszawa, Pollando, je la 28-a de aprilo, filo Vitoldo-Ludviko.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Jeangirard, S-ino Vidvino, Paris, forpasis je la 2-a de aŭg., 74-jara. Membro de UEA dum longa tempo kaj fervora laboranto por la movado en Francujo kaj internacie.

Marseille, Charles, DM kaj estinta delegito de UEA, Paris, je la 19-a de aŭg., 64-jara.

Wästfelt, Karl, FD en Stockholm, kaj ĝis antaŭ kvar jaroj Ĉefdelegito en Svedujo, forpasis la 22-an de aŭg., nur 48-jara.

Pripensoj postkongresaj

Post ĉiu kongreso trudas sin al respondeca persono en la movado la demando, ĉu la granda klopodo, kiun necesigas tia manifestacio, estas pravigata per la rezultato dezirita. Alia demando estas, ĉu ni povos valorigi certajn rezultatojn kaj spertojn. Pri la unua demando, nome, la senco de nia jara manifestacio, estas superflue diskuti: ĝi estas unuavice la pruvo al la cetera mondo, ke ni ekzistas, kaj por ni mem, la nepra bezono nin vidi, diskuti ĉefajn problemojn, difini estontajn sintenon kaj agadon.

La universala kongreso de Esperanto ŝanĝis sian aspekton. Se en la kongresoj ĝis 1924 proksimume, la individua esperantisto estris la situacion, tiam lin poste anstataŭis la *delegito* aŭ la sendito de organizaĵoj. Aliforte, malantaŭ la parolanto staras ideo aŭ fakte organizita aro da *sam-ide-anoj* en difinita senco. La kongreso nuna aŭdas raportojn, pli malpli difinas aŭ aprobas ion, sed la plenumo dependas poste de la ĝisfunda ekzameno per la respondecaj faktoroj: Komitato-Estraro de U.E.A., Landaj Asocioj, eventuale Fakaj organizaĵoj. La Universala Kongreso ne estas parlamento decidpova. Ĝi estas organo kun konsulta karaktero.

Kreskis konsiderinde la laboroj malantaŭ la kulisoj, nome la kunvenoj de la Komitato kaj Estraro. Dekfoje (kvarfoje la Estraro, kvinfoje la Komitato, unufoje ĉefdelegitoj kaj perantoj) kunvenis la plenumantaj povoj de la Asocio—minimume tridek horojn kune. Anstataŭ Prezidanto Malmgren, forestinta pro malsano, prezidis D-ro Kempeneers kompetente kaj decide. **Limigi** la diskutojn je la

plej necesa, **haltigi** la parolemon de iuj, **normigi** la tutaĵon, postulas aŭtoritatecon kaj takton. D-ro Kempeneers plenumis ĉi tiujn kondiĉojn kaj dank' al tio la riĉa tagordo kun sepdek eroj povis esti prilaborita. Li havis la feliĉan ideon starigi komisionojn el la Komitato, kun la tasko ekzameni certajn aferojn kaj devo raportu al la Plena kunsido de la Komitato. (Paralelo en tiu ĉi *sekciado* estas la kvar sekcioj de la Kongreso, raciigo kaj sistemigo de nia laboro.)

Ĉi tiun dispartigon de interna laboro kun samtempa laborigo de Komitatanoj (kiuj do ne nur voĉdonas ion, sed preparas kaj difinas ĝin) estas valora provo, ne plu mankebla.

Alia bona sperto estas la kunveno de la loka gazetaro kun informado. Por la estontaj kongresoj oni devas ankoraŭ pli bone atenti tiun ĉi eron—tre gravan—de nia propagando kaj informado, krei agrablan atmosferon ĉirkaŭ la ĵurnalistoj, prepari tekstojn uzeblajn tuj k.a.

La inaŭguro de la Esperanto-placo devas esti ekzemplo por sekvontaj kongres-urboj. Jam frue la Loka Kongresa Komitato devas dediĉi al tiu ĉi ero sian tutan atenton. Ĝenerala regulo por atingi tion ne ekzistas: estas loka afero.

Io tute nova estis provita kaj ni diru tion sukcese: nome la infangardejo, kie oni povis admiri infanojn bonege babilantaj en Esperanto. Iu samideano iom malice opiniis, ke ĉi tiuj infanoj devus esti ekzemploj por certaj "eternaj" lernantoj plenkreskaj balbutantaj la lingvon.

Altiĝis videble la kultura nivelo de la tutaĵo, ĉu de la kongresaj aranĝoj,



Postkongresaj

Aranĝoj

La kvintaga ekskurso

La kvintaga ekskurso tra la Bavara Alpregiono lasis al ni multajn karajn memorojn, spite kelkajn teknikajn malfacilaĵojn survoje. Ne facile ni forgesos la simpatian kaj ĉarman enloĝantaron, nek la majestan pejzaĝon de tiu regiono.

Okdek ok Esperantistoj veturis en du komfortaj aŭtobusoj, loĝis dumnokte kutime en privataj domoj, kaj multon ŝuldas al du germanaj Esperantistoj, unu en ĉiu aŭtobuso, kiuj faris sian eblon por fari la ekskurson memorinda. Ili ja sukcesis, do al ambaŭ koran dankon. *D.K.*

daŭrigo (de p. 259)

ĉu de la partoprenintoj. La foresto de la "turistoj" estas morala gajno netaksebla.

Se la antaŭaj eroj ne incitas je kritiko, tiam alia devigas ne silenti. Kunvenas dumil homoj el kvardeko dalandoj, diskutas, laboras, amuziĝas, unuvorte vivoplena manifestacio en sama lingvo. Valorigi tion per la gazetaro, tio estas unu el la devoj de niaj Landaj Asocioj, kiuj devas nepre studi la kreon de Kongresa Pres-Servo ĉiu por sia propra lando. Niaj italaj amikoj plenumis tion dum la 36-a: zorganto iniciatplena, preparo de la detaloj antaŭe, redakto de koncizaj

Semajno en Saulgrub

Tre ĝuinda estis tiu ekskurso en Saulgrub, bela vilaĝo ne malproksime de Oberammergau. Kompreneble ni vizitis tiun urbon de la pasiondramo, kaj ankaŭ belajn kastelojn, preĝejojn, kavernojn, montojn kaj la kutimajn allogaĵojn por ĉiuj turistoj. La plej belaj memoroj, tamen, estas la afabla akcepto flanke de la vilaĝanoj en kies domoj ni loĝis; la infanoj, kiuj lernas kelkajn kantojn en Esperanto kaj regalis nin per ili je ĉiu ebla okazo; la vesperoj en la lokaj gastejoj, kaj la tre bonaj aranĝoj faritaj por ni de Kaplano Thalmaier, kiu estas eble la plej taŭga gvidanto de amika kunestado en Esperantujo. Kiam li ĉeestas estas neeble esti malgaja!

C.C.G.

tekstoj, regule senditaj al itala gazetaro. Tion oni ne povas fari dum la kongreso; ĝi necesas antaŭan preparon, planon, programon. Ekzemplo instruas.

Resumante ĉion, ni povas diri konvinke, ke la 36-a Kongreso pravigis la antaŭvidojn pri ĝi. Niaj bravaj norvegaj amikoj havas taskon ne facilan antaŭ si: Kongreso samnivela, eĉ superonta antaŭulon. Ni fidu je ili kaj ni frue decidiĝu por aliĝi.

Hans Jakob.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

Li akre ĉirkaŭrigardis. Ĉu ne videblas antaŭ aŭ dekstre strio de firma tero? Sed ĉie, kien lia rigardo povis trapenetri, kuŝis nur la frostita maro, sur kelkaj lokoj ondigita per glaci-rokoj aŭ neĝmontoj.

Subite li ekvidis malproksime antaŭ si, iomete dekstre, kelkajn malhelajn punktojn, kiuj frape reliefigis kontraŭ la blanka kovrilo de la maro.

Lupoj!

Kasson ne eksentis timon. Kontraŭe, li estis preskaŭ ĝoja, ĉar kie estas lupoj, tie la firma tero ne povas esti tre malproksima!

Kun novaj fortoj li instigis la hundojn.

Nur ke la lupoj ne ekvidu ilin! Kasson ja estas preparita por ĉio, li havas bonegan ripet-pafilon kaj sufiĉan provizon da kartoĉoj—sed nun, kiam li estas jam tiel proksima de la celo, estus domaĝe, se li estus retenita!

Li veturis kun la jungitaĵo malantaŭ unu altan glaciblokon kaj tie kaŝis sin.

Poste li singarde ekrigardis sur la glaci-an ebenaĵon. Li ekĝojis. La lupoj kuris laŭ la malproksima horizonto kaj ili celis tiudirekten, de kie Kasson alveturis. Ili kuregis kiel la vento. Post kelkaj momentoj ili malaperis.

Li libere respiris kaj kun novaj fortoj, kiujn al li donis la penso, ke la celo ne povas esti jam tro malproksima, li instigis la hundojn al pli rapida veturo.

Ne longe ili veturis trankvile.

Subite la hundoj maltrankviligis. Sen tio, ke Kasson instigis ilin, ili plirapidigis la kuron tiel ke la sledo preskaŭ flugis.

Kion tio povas signifi? Ĉu la hundoj sentas novan aron da lupoj? Aŭ ĉu ekestas jam nova danĝero en la formo de glaci-urso?

Kasson maltrankvile ĉirkaŭrigardis. Kiam li rigardis malantaŭen, li tuj komprenis la ekscitiĝon de la hundoj.

La jungaĵo estis persekutata per aro da lupoj. Ili estis la samaj, kiujn li ekvidis pli frue. Survoje ili ekvidis la freŝajn postsignojn de la sledo de Kasson kaj nun sekvas ilin.

Li svingis la vipon, ekkriis al la hundoj—kaj tiuj ekkuregis sur la ebenaĵo kiel rapida ventego. La timo antaŭ la malsataj lupoj donis al ili nekredoblajn fortojn.

Gunnard Kasson renkontis lupojn jam kelkfoje dum sia vivo. Li konis ilin bone jam en Finnlando. Ankaŭ ĉi tie, en Alasko, li partoprenis kelkajn ekspediciojn kontraŭ tiuj ĉi rabaj bestoj, kiam ili vintre fariĝis pli atakemaj kaj minacis la sendanĝerecon de la vilaĝo.

Sed li neniam renkontis ilin en tiaj cirkonstancoj kiaj nun, kiam sur li kuŝas la respondeco por la ŝavado de tiom da vivoj! Kaj ĝuste tio estis la kaŭzo, pro kiu lia mano ektremis, kiam li celdirektis la pafilon al unu granda lupo, kiu antaŭkuris la tutan aron je kelkaj metroj. Sed li tuj regis sin.

Eksonis mallonga pafo. La lupo saltegis alten kaj restis kuŝanta sur la loko. La ceteraj ĵetis sin al la vundita kunulo.

Tiu ĉi momento sufiĉis al Kasson por gajni grandan distancon.

Sed jam proksimiĝis la aro denove! Kaj ankoraŭ pli rapide kaj pli rabe, ĉar laodoro de la freŝa sanĝo pligrandigis ilian furiozon.

Ankoraŭ kelkfoje pafis Kasson. Ĉiufoje restis unu lupo sur la glacio kaj la aro englutis la neatenditan pecon. Malgraŭ tio la distanco inter la jungaĵo kaj lupoj senĉese malpligrandiĝis.

Nur la rapideco de la hundoj ne ŝanĝiĝis. Ili sentis la danĝeron tuj ĉe la malantaŭo, tial Kasson ne bezonis ilin instigi.

Subite la sledo surveturis malgrandan glaciblokon. Ĝi saltetis pli alten, kaj antaŭ ol Kasson povis tion malebligi, falis el ĝi la skatolo kun la kartoĉoj!

Kasson ekstremsis.

Nun li estas preskaŭ senarma. En la pafilo li havas ja ankoraŭ tri aŭ kvar kartoĉojn, sed kio estas tio kontraŭ la malsata aro, en kiu troviĝas ankoraŭ nun pli ol dudek lupoj!

La unusola savo kuŝas nun en la rapideco de la hundoj. Sed kiel longe povos daŭri tiu ĉi freneza kurego?

En la lasta momento Kasson ekhavis feliĉan ideon. Li kaptis sakon kun la viando, kiun li havis kiel nutraĵon por la hundoj. Li komencis ĵeti pecon post peco al la lupoj. Komence ili haltis ĉe ĉiu peco, ili batalis pri ĝi—kaj Kasson gajnis kelkajn valoregajn sekundojn. Sed kiam la afero plurfoje ripetiĝis, la lupoj eksciis, ke la malgranda peceto ne sufiĉos por ili ĉiuj. Pro tio ili lasis la viandon al la unua, kiu ekmordis ĝin, kaj kuregis pluen.

Poste Kasson malfermis la tutan sakon kaj dismetis ĝian enhavon sur la teron. Tiun ĉi fojon ĉiuj lupoj haltis kaj dum kelkaj momentoj ili estis denove tenitaj.

Kasson turnis sian tutan atenton al la jungaĵo kaj al la vojo antaŭe.

Kiel priskribi lian ektimon, kiam anstataŭ la firma tero, kies proksimecon li jam antaŭvidis, li rimarkis antaŭ si altan glacimonton, etendiĝantan longan distancon dekstren kaj maldekstren!

Per unu rigardo li konvinkiĝis, ke surgrimpi ĝin ne estas eble. Kaj ĉirkaŭveturi ĝin—por tio estis jam tro malfrue . . .

Li ekkomprenis, ke tio signifas la finon . . .

Li haltis ĉe la glacimonto. Rapide li tratranĉis la rimenojn, per kiuj la hundoj estis jungitaj. Unua li liberigis la gvidantan hundon Fulmon.

“Fulmo, ek al ili!” li ekkriis.

La hundo obeis. Kuraĝe ĝi ekkuris kontraŭ la aro, kiu rapide proksimiĝis.

La ceteraj hundoj ekhezitis, kvazaŭ ili volus diskuri. Sed finfine ili tamen altiriĝis per la kuraĝo de la gvidanto.

Komenciĝis malespera batalo.

Kasson pafis per la restantaj kartoĉoj. Poste li alsaltis al la hundoj kaj helpis ilin per fortaj bategoj de sia pafilo.



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94, rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum, 298m. I. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.04m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.55, sed anst. 16.87m., sur 19.60m.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	17.30–17.50	Roma. 25.40m., 31.35m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 445m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

La elsendoj de Lille estas interrompataj inter 15 julio kaj 15 oktobro.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 241

7-an de Septembro 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de Aŭgusto kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	7063	6667
Individuaj membroj :		
MJ 837		858
MA 4179		4461
MS 288		275
Patronoj .. 15		16
DM 206		228
HM 56		59
	5581	5897
	12644	12564

DELEGITOJ

Belgujo

Sint-Kruis. FD (Impostoj) : G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51.

Brazilo

Bauru. VD : L. A. Bartholomeu, Caixa postal 232.

FD (Fervojaj aferoj) : I. da C. Barbosa, Rua Quintino Bocaiuva 6—16.

Coração de Jesùs. D : Wilson Veado, Coração de Jesùs, Norte de Minas.

FD (Juro) : La D.

Ribeirão Preto. FD (Sociologio) : Benedicto Silva, 1a Seção dos Correios e Telégrafos.

Vitória de Sto. Antônio. D : A. Barnabé dos Santos Cavalcanti, Rua Ambrósio Machado 112.

Britujo

Bath. D : F. Harris, 7 Kennington Road, Lower Weston.

Manchester. VD : S-ino J. S. Ryan, 94 Button Lane, Northenden.

Finnlando

Somerniemi. D kaj FD (Filozofio) : vakas.

Indonezio

Sabang. D : vakas.

Italujo

Catania. VD : G. Selvaggi, Piazza Federico di Svevia 74.

Nederlando

Vught. D : vakas pro morto.

Svedujo

Stockholm. FD (Fervoja signaltekniko) : vakas pro morto.

Vingaker. D : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Miranda Ludolf, J. A. de, Rio de Janeiro, Brazilo

Vasconcellos Lopes, A. L. de, Rio de Janeiro, Brazilo

Zêus Wantuil, S-ro, Rio de Janeiro, Brazilo
Vieira de Araujo, D-ro A., S. João da Madeira, Portugalujo

Henrique, D-ro C., Lisboa, Portugalujo
Arni, Frato, Gent, Belgujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

280. Pádua, S-ro G., Rio de Janeiro, Brazilo

DONACOJ. V. Šalonon 7ŝ., kolektoj en Munkeno £43 8ŝ. 4p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Jarlibro. La dua parto de la jarlibro estas nun ĉe la presejo, kaj espereble ĝi povos eliri en la unua duono de oktobro.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*.

* * * *

La Komitato de U.E.A. kaj la LEA-Komitato de S.A.T. interkonsentis pri kunlaboro pri komuna agado koncerne la internacian propagandon tiel, ke se iu el la organizaĵoj trovas iun internacian projekton de ĝi planitan tiel ampleksa, ke ĝi memstare ne povas aŭ ne deziras efektivigi la aferon, ĝi antaŭ la findecido kontaktu la alian organizaĵon por tiel akiri kiel eble plej vastan bazon por la agado.

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto' por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Ĉiu helpas sian proksimulon, kaj diras al sia frato : Estu kuraĝa ! Jesaja 41.6.

Somero 1951. Geedzoj aŭ du amikinoj kiuj deziras someran libertempon ĉe farmbieno "au pair" skribu al S-ro Hickson, Cauldron Barn Farm, Swanage, Anglujo.

Essen, la koro de la germana karbminea regiono, invitas la tutan mondon korespondi reciproke kaj viziti ĝin. Tranokteblecoj laŭplaĉe en malmultekostaj aŭ luksaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj. Vizitservo konigos la mirindan ĉirkaŭaĵon. Skribu al D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Studanto deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Adreso : Renato Zuccolo, Rua Tupi 623, Sao Paulo, Capital, Brazilo.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Por elprovi la kapablon de la helpa lingvo, mi serĉas anglolingvanon, kiu volas instrui al mi la anglan kaj samtempe lerni la portugalan, pere de Esperanto. Adreso : S-ro Aristoteles Juvenal, Rua Tomaz Gonzaga 137, Belo Horizonte, Minas Gerais, Brazilo.

AAAAAAIt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Adelberto Fonseca, Rua Dr. José Maria 908 (Rosarinho), Recife, Pernambuco, Brazilo, deziras interŝanĝi il. pk. kaj pm. kun ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj D-ro Herfort, Im Schlachthof, Duisburg-Hamborn, Germanujo.

IEKO faciligas internacian individuan korespondadon. Aliĝkotizo : tri respondkuponoj. Sendu koresponddezirojn al R. Melo en Meylieu-Montrond (Loire), Francujo.

Esperanta Sanulejo estas fondota, kie oni povas vivi kaj lerni plejeble fariĝi centjara. Kiu sendos donacon por la sanulejo povos demandi laŭplaĉe. Volonte respondos D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Ĉiulandaj fraŭlinoj, kiuj deziras korespondi, ĉiuj temoj, kaj per il. pk. skribu al Armando de Lacerda, Travessa das Baldracas 50—3, Lisboa, Portugalujo.

Ĉiulandaj gekampistoj, kiuj deziros interŝanĝi flagetojn, metalinsignojn, ĵurnalojn, revuojn, k.t.p., kaj korespondadi, skribu al Armando de Lacerda, Travessa das Baldracas 50—3, Lisboa, Portugalujo.

Grava propagando ! Firmao deziras eksporti medikamentojn per Esp. Petu amase prezliston. ROY, P.K.340, Le Havre, Francujo.

Deziras korespondi 27-jara fraŭlo kun ekstereŭropanoj, precipe kun nigraj, brunaj, flavaj, kaj ruĝaj gesamideanoj. S-ro Miklos Abrahám, Vöröshadsereg-utja 10.II.6, Budapest II, Hungarujo.

S-ino Halina Denenfeld sciigas siajn gemikojn ke malgraŭ du aŭ trifoja ĉijara skribado al ĉiuj, ŝi ricevis nek unu vorton de gekorespondantoj. Pro ŝia transloĝiĝo la nova adreso estas : s-ino Halina Denenfeld, ul. Holdu Pruskiego 11, Klodzko (Dolny Slask), Pollando.

Mi volas interŝanĝi la jenajn librojn kontraŭ aliaj samvaloraj : Popolkantaro de Murcia (51 paĝoj), Ferdinand VI kaj Farinelli (32), Du junaj fraŭlinoj kaj Korneliino (70), Santander (128), Helpanta Temaro (112). Sendu proponojn al J. Lopez Herrero, Conde Peñalver 52, Madrid, Hispanujo.

Butikfenestra ekspozicio aranĝiĝos en fino de decembro. Bonvolu sendi materialojn : ĵurnalojn, turismajn afiŝojn, broŝurojn, prospektojn, k.t.p. Bodø Esperantoklubo, Urtegårdsgata, Bodø, Norvegujo.

Dezirante migri en Amerikon, mi petas moralan helpon. Ĉu vi povas helpi min ? José Hernandez, Provenza 325, Barcelona, Hispanujo.

Deziras korespondi pri sociaj sciencoj, fotografaĵoj kaj poŝtmarkoj, S-ro Chopard, 15 bis rue du Canal, St. Denis (Seine), Francujo.

Dek unu belaj vidaĵpoŝtkartoj ĉeĥaj por 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj, afrankite. Mendu ĉe U.E.A.

S-ro José Hernández, Maipu 450, Buenos Aires, Argentino, korespondos kun gesamideanoj tutmondaj.

37-a Universala Kongreso de Esperanto

OSLO, 2a-9a de AŬGUSTO 1952

Adreso :

BOKS 942, OSLO, NORVEGUJO

Aliĝilojn kaj pagojn akceptas ankaŭ

U.E.A., HERONSGATE, RICKMANSWORTH, ANGLUJO

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 37-a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo, kaj samtempe mi sendas pagon.

Familia nomo¹ S-ro, S-ino, F-ino

Antaŭnomo (voknomo)¹

Strato kaj numero¹

Urbo¹

Provinco¹

(nur en landoj, kie la poŝto postulas tion)

Lando²

Profesio²

Nacieco²

Antaŭnomo de edzino aŭ infano, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj)

aliĝas al la Kongreso

Naskiĝa jaro de persono malpli ol 20-jara

Dato

(subskribo)

¹ En nacia lingvo

² En Esperanto

Aliĝoj ne estos akceptataj post la fino de junio 1952

Skribu klare, se eble per skribmaŝino

KONGRES-KOTIZOJ

	ĝis 31/12/51	ĝis 31/3/52	poste
*Kongresano	35 ŝil.	40 ŝil.	45 ŝil.
†Edzo aŭ edzino de kongresano	17ŝ. 6p.	20 ŝil.	22ŝ. 6p.
Junul(in)o ne pli ol 20-jara ..	12ŝ.	13ŝ. 6p.	15 ŝil.
* Individuaj membroj de UEA pagas 5 ŝil. malpli.			
† Individuaj membroj de UEA pagas 2ŝ. 6p. malpli.			